



*Esperanto  
en Danio*

**Speciala numero • septembro 2009**



**Ivo Lapenna 5.11.1909 - 15.12.1987**

# Ivo Lapenna

## Biografiaj Notoj

*Biografiaj Notoj* estas publikigita en la internacia kultura kaj informa revuo *Horizonto* n-ro 6/1984.

Kun la celo havi aŭtentikajn informojn ni petis Profesoron Doktoron Ivo Lapenna sciigi al ni detalajn aŭtobiografiajn notojn. Red.: D-ro Paul Neergaard.

IVO LAPENNA naskiĝis en Split (Dalmatio, Jugoslavio) la 5-an de novembro 1909 en malnova dalmata, aristokrata familio. La patro, Petar, estis akademia konstruĝeniero kaj univ. profesoro, la patrino, Amelia, pianistino. Li studis klasikan gimnazion en Split, poste en Zagreb, kie li abiturientiĝis kun bonega sukceso. Juron li studis en la Jura Fakultato de la Universitato de Zagreb, diplomiĝis kun eminenta rezulto en 1932 kaj doktoriĝis la 31-an de oktobro 1933. En la sama jaro li finis la okjaran mezgradan lernejon de la Muzika Akademio en Zagreb (violonĉelo) kaj diplomiĝis kiel mezgrada instruisto de muziko. Post la deviga soldatservo en la lernejo por la rezervaj oficiroj en Tuzla (Bosnio) en 1933/34, kiun li finis kiel la unua en la rango kaj fariĝis rezerva leŭtenanto, li praktikis kiel juĝista-advokata kandidato en kortumoj kaj en advokataj oficejoj, laste kaj plej longe en tiu de la konata progresema advokato, D-ro Ante Ramljak. Li faris la t.n. praktikan juĝistan-advokatan ekzamenon en 1938 en la Apelacia Kortumo de Zagreb. D-ro Ramljak ofte defendis akuzitojn en politikaj kazoj kun la helpo de D-ro Lapenna. Ili fariĝis bonaj amikoj. Ramljak poste ellernis Esperanton.

La 10-an de aprilo 1941 la naziaj kaj ustaŝaj trupoj okupis Zagreb. D-ro Lapenna, kiu pro siaj demokrataj, progresemaj ideoj kaj aktivadoj, inkluzive la laboron por Esperanto, troviĝis sur la listo de arestotoj kaj deportotoj, tuj "subteriĝis" kaj fine de julio 1941 per falsa pasporto sukcesis fuĝi en Split, tiutempe sub itala-faŝista okupiteco. Li aliĝis al la Naciliberiga Movado kaj en 1943 al la Naciliberiga Armeo. Li plenumadis



Ivo Lapenna kun sia violonĉelo

diversajn taskojn sur la teritorioj liberigitaj de la partizanoj en Bosnio, Norda Dalmatio kaj sur la insuloj Braĉ, Hvar kaj Vis, ĉefe korespondanto de Slobodna Dalmacija (Libera Dalmatio). Komence de 1944 li estis sendita en Bari (Italio) por fariĝi redaktoro de Dnevne Vijesti (Tagnovaĵoj) de la Jugoslavia Milita Misio en Bari kaj, iom poste, de Glasnik Ujedinjenih Nacija (Heroldo de Unuiĝintaj Nacioj), kiun la aliancana aviadilaro ĵetadis en 10 milionoj da ekzempleroj sur la okupitan teritorion de Jugoslavio tri fojojn semajne.

Ekde aprilo 1944 ĝis la fino de la milito en majo 1945 li estis ĉefredaktoro de Libera Dalmatio (Slobodna Dalmacija) unue semajna en kavo sur la insulo Vis, kaj poste ĉiutaga en liberigita Split. En novembro 1943 li sukcesis organizi konferenceton de dekkvino da esperantistoj en la urbeto Livno (Bosnio), ĉirkaŭita de la malamikaj trupoj. Oni aŭdadis la tondradon de kanonoj. En 1945 li estis demobilizita kaj fariĝis rezerva oficiro de la Jugoslavia Armeo kun la grado de majoro.

Post la milito li unue estis ĉefo de la Departemento pri Hejma Preso de PR Kroatio kaj iom poste redaktoro de Narodne Novine (Oficiala Gazeto) de PR Kroatio. Sekvis laŭvice: docento, iom poste profesoro pri Internacia Juro kaj Internaciaj Rilatoj en la Jura Fakultato de la Universitato en Zagreb; samtempe lekciisto pri Historio de Diplomatiaj Rilatoj kaj Historio de Politikaj Doktrinoj; paralele honoraria lekciisto pri Internaciaj Rilatoj en la Ekonomika Fakultato; eksperto pri Internacia Juro en la Delegacio de Jugoslavio ĉe la Packonferenco en Parizo en 1946; advokato-konsilisto de Albanio en la proceso kontraŭ Britio pro la incidentoj en la Markolo de Korfu antaŭ la Internacia Kortumo en Hago en 1947/48; ekde 1948 Membro-Korespondanto de la Jugoslavia Akademio de Sciencoj kaj Artoj en Zagreb. Krome, partoprenis en la redaktado kaj verkado de Zbornik Pravnog Fakulteta u Zagrebu (Kolekto de la Jura Fakultato en Zagreb) kaj estis membro de la redakta komitato de la ĉefa jugoslavia jura periodaĵo Arhiv za Pravne i Društvene Nauke (Arkivo por la Juraj kaj Sociaj Sciencoj) en Beograd. Inter 1946 kaj 1949 ĉeestis plurajn landajn kaj internaciajn jursciencajn konferencojn en Beograd, Parizo, Bruselo kaj en la Akademio de Internacia Juro en Hago.

Ekde la fino de 1949 Ivo Lapenna rezidas ekster Jugoslavio. Unue li estis en Parizo kaj ekde la mezo de 1951 en Londono, kie li poste fariĝis brita

ŝtatano. Li estis kontrakta kunlaboranto de la franca Centre National de la Recherche Scientifique (Nacia Centro por Sciencaj Esploroj), por kiu li verkis sian Conceptions Soviétiques de Droit International Public (Sovetiaj Konceptoj de Internacia Publika Juro). En Londono li estis laŭvice: Ekde 1956 "research fellow" (esplorkolego), lekciisto, docento kaj mallonge post tio profesoro pri Kompara Sovetia kaj Orienteŭropa Juro en la mondfama The London School of Economics and Political Science de la Universitato de Londono, per kio li atingis sian duan profesorecon.



*Insigno de "The London School of Economics and Political Science"*

*En 1951 la mondfama sciencisto pri internacia politiko ĉe la menciita Universitato, Prof. Leonard Schapiro, petis la same mondfaman scienciston, Prof. D-ro Ivo Lapenna, veni al "The London School of Economics and Political Science", kie li atingis sian duan profesorecon – ĉi-foje pri Kompara Sovetia kaj Orienteŭropa Juro [BL].*

Post sia pensiigo en oktobro 1977 li ricevis la titolon de "Em. Profesoro de Kompara Sovetia kaj Orienteŭropa Juro de la Universitato de Londono", sed, laŭ la peto de la universitataj aŭtoritatoj, daŭrigas sian kutiman universitatan laboron. En 1972 li ricevis de la Universitato en Fort Lauderdale (Usono) la titolon de "Doktoro honoris causa pri Internaciaj Rilatoj". Li fariĝis membro de pluraj jursciencaj institutoj kaj societoj, el kiuj la plej grava estas la Instituto pri Mondaj Aferoj (Institute of World Affairs) en Londono. Aldone al sia instrua kaj jursciencala laboro en la Universitato de Londono, Prof. Lapenna lekciis kiel invitito aŭ gastprofesoro en multaj aliaj universitatoj aŭ jursciencaj institutoj, ekz. en tiuj de Beograd, Uppsala, Stockholm, Hamburg, Köln, München, Venezia, Paris, Strasbourg, New York, Washington, Harvard, Yale, Sydney, Camberra.



*Birthe kaj Ivo Lapenna, 1982*

*Ivo Lapenna forpasis la 15-an de decembro 1987 en Kopenhago kaj estas entombigita tie.*

## **Funkcioj kaj laboro en la Esperanto-Movado**

Ellernis Esperanton kiel memlernanto en 1928. Kunfondinto de Studenta Esperanto-Klubo (poste Akademia Esperanto-Klubo) en la Universitato de Zagreb en 1929, kaj ĝia prezidanto ĝis aprilo 1941; fondinto de Studenta Tutmonda Esperanto-Ligo (STELO) dum la UK en Budapeŝto en 1929, kaj ĝia prezidanto ĝis la komenciĝo de la Dua Mondmilito; prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Ligo de 1937-1950; komitatano kaj estrarano de IEL (ekde 1947 UEA) de 1938 -1974; ĝenerala sekretario de UEA de 1955-1964; prezidanto de UEA de 1964-1974; fondinto de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ) en 1957 kaj ekde tiam ĝia prezidanto, iniciatinto kaj dum pluraj jaroj redaktoro de ĝia organo Internacia Jura Revuo; membro de la Akademio de Esperanto ekde 1952; kunfondinto de Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado (ICNEM) en 1980 ekde tiam ĝia prezidanto; membro de la redakta komitato de Horizonte kaj ĝia ĉefa kunlaboranto.

## **Ĉefaj etapoj en la konstruado de la moderna internacia Esperanto-Movado**

1949:

Iniciatis la fondon kaj ellaboris la regularojn de Internacia Somera Universitato, Belartaj Konkursoj (propono de R. Rosetti) kaj Oratoraj Konkursoj.

1950:

Organizo de la unua Kongresa Gazetara Servo por ebligi kontaktojn kun la publiko.

1950-1951:

Prelegvojaĝo dum kiu li faris pli ol 300 prelegojn en 108 urboj en ses landoj de Okcidenta Eŭropo, pluraj miloj da aŭskultantoj. Vigligo de la Movado en tre multaj lokoj.

1952:

Fondis la Centron de Esploro kaj Dokumentado (CED), fariĝis ĝia Honorofica Direktoro kaj restis en tiu pozicio ĝis 1975.

1952-1954:

Grandaj kampanjoj lige kun la Peticio al UN/Unesko, kronitaj per la konsultaj rilatoj inter UEA kaj Unesko kaj per la Rezolucio de Unesko de la 10-a de decembro 1954. Miloj da artikoloj en la monda gazetararo.

1955:

Ellaboro de projekto de nova, moderna Statuto de UEA, ellaboro de la Unua Baza Programo de UEA, organizo de la informa laboro, kreo de informaj fakoj kaj amasa aktivigo de la informado pri Esperanto.

1956:

Ellaboro de la bazaj Principoj de Informado kaj akcepto de tiuj principoj en Frostavallen post plurtagaj diskutoj (Principaro de Frostavallen).

1957:

Fondo de Koresponda Servo kaj Magnetofona Servo laŭ iniciato de R. Eichholz. Fondo de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ).

1958:

50-jara datreveno de la fondiĝo de UEA, granda publikeco donita al tiu evento.

1959:

Impona Zamenhof-Jaro kun amaso da artikoloj en nacilingvaj periodaĵoj, ekspozicioj, prelegoj, informoj en radio kaj televido, festoj okaze de plia rondvojaĝo de Ivo Lapenna en kelkaj landoj kun kulmina, altnivela festo en Kopenhago. Zamenhof deklarita unu el la grandaj personecoj de la homaro fare de Unesko.



*Estrarkunsido de UEA, printempo 1960. De maldekstre: Ĝenerala Sekretario Prof. D-ro Ivo Lapenna; Redaktorino de la revuo "Esperanto" Kirsten Zacho; Vicprez. H.W. Holmes; S-ro Norman Smith; S-ro A. Rajski; D-ro W. Herrmann kaj Prezidanto, Prof. D-ro Giorgio Canuto.*

1960:

Ellaborita la Regularo pri Internaciaj Ekzamenoj, unuaj ekzamenoj.

1961:

Arta Festivalo en Harrogate, aĉeto de la domo de UEA en Rotterdam per rimedoj havigitaj ĉefe dank'al jura argumentado kaj negocado de Ivo Lapenna. Post sukcesaj intervenoj UEA ricevis la prestiĝan pozicion B en la rilatoj kun Unesko.

1962

Plenumo de la Unua Baza Programo preskaŭ komplete kaj akcepto de la Dua Baza Laborprogramo.

1963-1964

Grava lerneja konferenco, Dua Arta Festivalo, ekeldono de Monda Kulturo (post longaj preparlaboroj), komenciĝo de la preparlaboroj por la Jaro de Internacia Kunlaboro laŭ aparta multdirekta programo.

1965-1966

Realigado de la Programo por IJK, amasa kolektado de subskriboj je la Propono al UN, transdono de la Propono en ceremonio de la 6-a de oktobro 1966 en la Sekretariato de UN en New York (pri detaloj v. ĉ. 22.4 de Esperanto en Perspektivo ). La Proponon entute subskribis preskaŭ unu miliono da unuopuloj kaj 3846 organizaĵoj kun preskaŭ 73 milionoj da membroj.

1967-1968:

Preparlaboroj kaj realigo de la programo por la Jaro de Homaj Rajtoj; kolekto de financa bazo, preparlaboroj kaj aperigo de la prestiĝa La Monda Lingvo-Problemo en 1968.

1969-1970:

Ellaboro de speciala plano por la Internacia Jaro de Edukado; prelegvojaĝo kun lekcioj pri fakaj-juraj temoj en la finnaj universitatoj en Esperanto kun nacilingvaj tradukoj.

1971:

Forumo dum la UK en Londono kun partopreno de reprezentantoj de British Council, Goethe Societo kaj aliaj; la tuta materialo eldonita en 1971 ankaŭ kiel aparta broŝuro sub la titolo La Problemo de Lingva Komunikado en la Mondo. Plenumo de la Dua Baza Laborprogramo kaj ellaboro de la Tria.

1972-1973:

Reviziado de la projekto de la Tria Baza Programo kontraŭe al la konceptoj de Ivo Lapenna, akcepto de la reviziita teksto en 1973, poste neniam realigita.

1974-1984:

Multnombraj artikoloj, prelegoj kaj paroladoj kun la celo revenigi UEA sur la vojon de aktiva neŭtraleco, sendependeco kaj plua laŭplana laboro surbaze de la principoj montriĝintaj korektaj ĝis 1974.

En 1974 publikigo de Esperanto en Perspektivo: Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo. Krome: ellaboro de Programo por agado de Eŭropa Klubo en Eŭropo; iniciato de komunaj agadoj por la Jubilea Jaro 1987 kaj Projekto de Baza Programo por tiuj agadoj (ambaŭ, bedaŭrinde, ne realigataj).

## **Instruado de Esperanto**

Lernolibro Esperanto u Deset Lekcija (Esperanto en Dek Lecionoj), tri eldonoj, la lasta en 1945, kaj 77 kursoj por komencantoj, progresintoj kaj pri parolarto inter 1929 kaj 1949.

## **Ĉefaj verkoj en Esperanto**

### *Retoriko*

Unua eldono: Les Presses de l'Imprimerie Moderne B Langres (Hte-Marne), Paris 1950. Dua eldono, reverkita kaj kompletigita: Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam 1958. Tria eldono, korektita: Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam 1971. Publikigita ankaŭ en japana traduko, 1974.

### *Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo*

Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam 1952.

### *La Internacia Lingvo*

Universala Esperanto-Asocio, Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED), London 1954.

### *Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro*

Redaktoro. Universala Esperanto-Asocio, Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED), London 1960.

### *Elektitaj Paroladoj kaj Prelegoj*

Publikigita de la aŭtoro, Rotterdam 1966.

### *Por Pli Efika Informado*

Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam 1974.

### *Esperanto en Perspektivo: Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo*

Ĉefredaktoro kaj ĉefaŭtoro. Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo, London-Rotterdam 1974.

### *Hamburgo en Retrospektivo: Dokumentoj kaj Materialoj pri la*

### *Kontraŭneŭtraleca Politika Konspiro en Universala Esperanto-Asocio*

Unua eldono: Sarlanda Esperanto-Ligo, Saarbrücken 1975. Dua



Kompletigita Eldono: Eldonejo "Horizonto" (poste "Eldonejo Perspektivo"), Kopenhago 1977.

*Kritikaj Studoj Defende de Esperanto*

Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado (ICNEM),  
(Eldonejo "Perspektivo") Kopenhago 1987.

*Juraj Terminologiaj Problemoj kun Aparta Konsidero al Esperantlingva Jura Terminologio*

Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ), "Eldonejo Perspektivo", Londono-Kopenhago 1987.

*CED-Dokumentaro*

Ĉ. 300 dokumentoj en Esperanto kaj en la angla, multaj ankaŭ en la franca kaj en aliaj lingvoj, verkitaj de Ivo Lapenna.

*Krome*

Ĉ. 1500 artikoloj kaj amaso da noticoj, recenzoj kaj similaj tekstoj en Esperanto kaj en diversaj naciaj lingvoj pri Esperanto aŭ lige kun ĝi.

Tiu poresperanta aktivado proporcie dividita inter la bazaj agadsferoj – scienca dokumentado, informado, instruado, praktikaj servoj en la plej vasta senco de la vorto – postulis minimume 65.000 efektivajn laborhorojn inter 1929 kaj 1984.

## **Ĉefaj jursciencaj verkoj en naciaj lingvoj**

*Ujedinjene Nacije*

(Unuiĝintaj Nacioj) en la kroata. Tisak Nakladnog Zavoda Hrvatske u Zagrebu, Zagreb 1949.

*Historija Diplomacije I kaj Historija Diplomacije II*

(Historio de Diplomatio I kaj II) en la kroata. Tisak Sveučilišne Litografija, Zagreb 1949.

*Conceptions Soviétiques de Droit International Public*

(Sovetiaj Konceptoj de Internacia Publika Juro) en la franca. Eldonejo A. Pedone, Librairie de la Cour d'Appel et del'Ordre des Avocats, 13, rue Soufflot, 13, Paris 1954.

*State and Law: Soviet and Yugoslav Theory*

(Ŝtato kaj Juro: Sovetia kaj Jugoslavia Teorioj) en la angla. The London School of Economics and Political Science, University of London, and Yale University Press, London-New Haven 1964.

### *Soviet Penal Policy*

(Sovetia Punjura Politiko) en la angla. The London School of Economics and Political Science, University of London, London 1968. Reeldonita de Greenwood Press, Westport, Connecticut 1980.

### *Krome*

Ĉ. 150 jursciencaj monografoj, studoj kaj artikoloj en la kroata, angla, franca, itala, germana kaj Esperanto.

### **Scio de lingvoj**

Pasive kaj aktive: kroata, Esperanto, angla, franca, itala, germana, rusa; nur pasive pli aŭ malpli bone: slovena, makedona, bulgara, ĉeĥa, slovaka, hispana, latina kaj antikva greka (nur tre malmulte).

### **Sporto**

Kiel juna homo: biciklado, naĝado, skiado, atletiko, precipe mezdistanca kurado (mallongdaŭraj jugoslaviaj rekordoj je 400 kaj 800 metroj).

### **Por Paco en Libereco – Por Libereco en Paco**

## **La Rezolucio de Unesko**

La fama Rezolucio de Unesko, atingita de Ivo Lapenna, , Montevideo 1954:

”

IV.4.422 La Ĝenerala Konferenco, diskutinte la Raporton de la Ĝenerala Direktoro pri la Internacia Peticio favore al Esperanto:

IV.4.4221 Notas la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo;

IV.4.4222 Rekonas, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko;

IV.4.4223 Notas, ke pluraj Ŝtatoj-Membroj informis pri sia preteco enkonduki aŭ ampleksigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj, kaj petas tiujn Ŝtatojn-Membrojn informadi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu kampo;

IV.4.4224 Komisias la Ĝeneralan Direktoron sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo, kaj tiucele kunlabori kun Universala Esperanto-Asocio en aferoj koncernantaj ambaŭ organizaĵojn.

”

Post la streĉa venko, la 10-an de decembro 1954, Ivo Lapenna skribis el Montevideo:

”Mi sentis la gambojn paralizitaj. Mia korpo algluiĝis al la seĝo. En la salonego la decido estis salutita per forta aplaŭdo, apogata precipe de la galerioj. Homoj leviĝadis de sur siaj seĝoj kaj venadis al mi por gratuli ... Eĉ tute nekonatoj ... ”.

Bv. legi la hejmpaĝon de Fondaĵo Ivo Lapenna, kie vi trovas detalojn: [www.ivolapenna.org](http://www.ivolapenna.org).



*Unesko, Montevideo, 1954. Montevideo la 10-an de decembro 1954. Antaŭ la komenciĝo de la Plenkunsido de la Ĝenerala Konferenco de Unesko la 10-an de decembro 1954. Prof. D-ro Ivo Lapenna estas videbla en la fino de la meza koridoro, prenanta sian sidlokon. Originala foto: UNESCO (Unesko).*

## Ivo Lapenna venkis ĉe UNESKO

**Kvin poetoj pri Ivo Lapenna post lia venko ĉe UNESKO en  
Montevideo 1954**

**William Auld:**

### **Pensoj Post Montevideo**

Lin armas fera fido, integro kaj kuraĝo,  
kaj lian citadelon ne breĉas malespero :  
kiam plej malfavore grimacas sortvizaĝo,  
tiam li plej obstine ne cedas pri l' konkero.

Ho, Esperanto, lingvo de la homar' futura,  
kiel li vin servadas, kun kia amo pura !

Malican trivialon de ruzaj Blinkenbergoj  
li venkas per la ardo de pravo kaj sincero,  
kaj draŝas mokemulojn per nudaj vero-vergoj :  
lia koler' majestas kvazaŭ de Jupitero !

Al Esperanto, kara revo kaj pli ol revo,  
Lapenna sin dediĉis preter la nura devo !

Ni, kiuj Esperanton amas, lin amas kore,  
Mirakle li en Montevideo garnizonis ;  
en ĉi solena horo pripensu ni explore :  
ĉu ankaŭ ni ĝis limoj de nia forto donis ?

Samideanoj ! staras li antaŭ ni modele :  
lian ekzemplon grandan imitu ni fidele !

**Reto Rosetti:**

**Lapenna ĉe Unesko**

Ni scias nun pri l' tuta epopeo :  
kiel, sub ĉia baro kaj opono,  
li ŝiris el la faŭko de pereco

la venkon, per potenco de la kono  
kaj verovo de l' obstino. Li ĝin prenis  
per rajt' natura, kiel pandiono

la salmon ; kaj, se tamen iom svenis  
la fortoj pro la longa streĉo dura,  
la ardo de l' animo lin subtenis.

Li, en kiraso de l' kuraĝo nura,  
kiu penetris en la bastionon  
kaj ĉiujn pelis al paniko kura,

por nova cel' nun levas klarionon.  
Ho, se lin nur apogos la armeo,  
ni povus jam sieĝi Babilonon

por granda, fina venko de l' Ideo !

**Kaloman Kalocsay:**

*Kian impreson faris al vi nia venko  
en Montevideo?*

*Plej impresis min la grandioza  
fortostreĉo de Lapenna ; pri tio oni  
povas paroli nur en versoj:*

Lapenna venkis ĉe UNESKO  
Per strategi' kaj streĉo nerva :  
El la lastvica seĝ' observa .  
Grandiĝis kun mirakla kresko

Ĝis alto de l' plafona fresko.  
Jes, la nerezisteble verva  
Lapenna venkis ĉe UNESKO  
Per strategi' kaj streĉo nerva.

Kia ŝakmajstra fosforesko  
De cerbo ĉiam brile serva !  
Indigna, sed trankvilkonserva  
Pri l' aĉa Blinkenber-burlesko,

Lapenna venkis ĉe UNESKO.

**Marjorie Boulton:**

**Bildoj el mia albumo:**

Ivo Lapenna

Ivo Lapenna, ĉiusence granda,  
jen kosma energio propaganda,  
la enkarniĝ' de l'Esperanta vorto,  
La mondpotenco de morala forto!  
La Oratoro ardas kaj sinceras;  
erudicie la Juristo kleras;  
Organizanto indas je l'insigno;  
la Homo luktas pro la homa digno;  
la Diplomato lertas intervjue,  
kaj la Lingvisto poliglota flue;  
kaj ankaŭ li atletas kaj muzikas ...  
sed kiel lojalege li amikas!  
Ivo Lapenna, tiel multkapabla,  
sin montras homa, milda kaj afabla,  
kun simplaj homoj – simpla; kaj  
adoron  
forpuŝas, ĉar ĝi ĝenas lian koron.  
Kun aŭreolo, en la verda fresko,  
brilegas la Venkinto ĉe UNESKO,  
antaŭen gvidas nin per gesto bona.  
Kuraĝe do antaŭen kun Lapenna!

El: *Heroldo de Esperanto*,  
n-ro 8/1958

**Geraldo Mattos:**

**Ivo Lapenna**

Lapenna, verda ĉampiono,  
Per stilo rava kaj matura  
Sin montras en la fako jura  
Esperantista Cicerono.

Instruas kiel Salomono  
Justecon al epok' terura  
Lapenna, verda ĉampiono,  
Per stilo rava kaj matura.

Unesko cedis al propono  
De mondolingvo ununura,  
Ĉar ĝin necesa kaj natura  
Deklaris en logika tono

Lapenna, verda ĉampiono!

El: *Heroldo de Esperanto*, n-ro 1212,  
la 1-an de aprilo 1955, p. 2

## Leteroj

*Letero sendita al la prez. de la mondkonata Esperanto-klubo, Kleriga Konversacia Klubo (KKK), prez. de la Eldonejo KOKO kaj la iama redaktoro de la revuo "Esperanto", s-ino Kirsten Zacho, kiu forpasis jam la 17-an de januaro 1975 kaj sekve neniam vidis la suban leteron.*

"Montevideo, la 3-an de marto, 1975

F-ino [S-ino] Kirsten Zacho

København / Danlando

Altestimata samideanino,

Hodiaŭ matene mi ricevis du numerojn de "KURIERO" (7 kaj 9/1974) kun koncernaj aldonitaĵoj, kiujn vi bonvolis sendi al mi. Koregan dankon!

Mi gratulas vin kaj la ceterajn samideanojn de KKK kaj SEK, kiuj per kuraĝa decido ekŝiĝis el UEA, kvankam tiu ekŝiĝo, kune al aliaj samspecaj signifas grandan perdon por la movado ĝenerale – mi parolas pri la neŭtrala movado.

Post la okazintaĵoj en la Hamburga Kongreso, mi tuj ekŝiĝis el UEA. Nia Urugvaja Esperanto-Societo, post pristudo de la situacio, ankaŭ decidis ekŝiĝi kaj jam komunikis al la nova Prezidanto de UEA tiun gravan paŝon. La leteron de Prof. D-ro Lapenna pri la kaŭzoj de lia ekŝiĝo ni aperigis kiel aldono al nia bulteno "Noticias del Esperanto" (en hispana lingvo). Ni ankaŭ informis pri nia decido al aliaj E-Societoj en Latin-Ameriko, sed ĝis nun, ricevis nur respondon de Brazila Esperanto-Ligo, kiu jam estis ekŝiĝinta el UEA pro alia motivo, nome, la ekesto de Kultura Kooperativo de Esperantistoj, kiu estis oficiale rekonata de UEA kiel alia landa Organizaĵo. Tio pensigas min, ke K.K.E. estas samtendenca kiel la nuna UEA. Dume, nia Societo (UES) daŭrigos la poresperantan laboron, sed bedaŭrinde sen la nepre necesa kunlaboro de vasta organizaĵo – des pli bedaŭrinde tial, ke nia Movado ankoraŭ ne estas tiom forta por labori en diversaj landoj sendepende.

Mi nenion diras pri Prof. D-ro Lapenna ĉar ĉiuj miaj opinioj pri li koincidas kun la viaj. Mi havis la grandan honoron akompani D-ron Lapenna okaze de la 8-a Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Montevideo, en 1954 (tiam mi estis sekretario de nia UES) kaj eble scias pli, multe pli ol iu ajn esperantisto en la mondo, pri la teruraj momentoj de li travivitaj tie ĉi dum la Konferenco; pri lia senlaca laborado – tage kaj nokte – kaj pri lia HONESTEGA SINTENO al nia Movado. La Sukceso de Esperanto en tiu Konferenco estas nepre rezulto de la lerta, diplomatia kaj vigla agado de D-ro Lapenna.

Nun, mi kaj aliaj esperantistoj ĉi-tieaj esperas, ke la vere NEŬTRALA movado reorganiziĝos en Eŭropo (en aliaj kontinentoj ne estas ankoraŭ sufiĉe forta), por denove gvidi la agadon en la Mondo sur kunordigita unueca bazo.

Ĉiam je via dispono, kun plej alta estimo,

Croacia, 4358

Montevideo /URUGVAJO

Sudameriko

Victor Luis Cao”

[Prof.]

*Letero ricevita de Prof. D-ro I. F. Bociort:*

Berlino, 27.04.08

Tre estimata s-ino Lapenna,

Hieraŭ kaj hodiaŭ, la ortodoksoj, do ankaŭ la rumanoj, havis sian Paskofeston. Mia edzino kaj mi havis la plej valoran, plej agrablan gaston: Ivo Lapenna. Ni aŭskultis la diskojn afable senditajn de vi, ni reaŭskultis la diskon akompanantan la volumon Eseoj memore al Ivo Lapenna kaj denove rigardis la fotografaĵojn fine de la libro, ni konsideris la libron Elektitaj paroladoj kaj prelegoj (kun miaj sennombraj pozitivaj marĝenaj notoj), ni konsideris la Retorikon, kun la grava enkonduko, ni eĉ legis kelkajn ĉapitrojn verkitajn de Lapenna en Esperanto en Perspektivo. Tio



estis por ni ambaŭ granda spirita ĝojo. Ne eblas ĉi tie sintezi la multajn kaj validajn tezojn, konsilojn (kion fari, kion ne fari), novajn argumentojn por Eo kreitajn de tiu personeco sen kompara en la E-movado. Mi dubas ĉu iam aperos la dua relative egala al li.

.....

Cetere ni ankaŭ al kutimiĝu respekti kaj admiri, ĉar ne naskiĝas valoraj tie, kie mankas respekto por valoraj homoj kaj por iliaj gravaj atingajoj. Bedaŭrinde, en E-io troviĝas ankoraŭ orgojluloj, kiuj sentas sin personecoj, se ili, eĉ malprave, mallaŭdas personecojn.

Kion diri pri la hodiaŭaj improvizitaj teoriuloj, kiuj bombardas la movadon kun falsaj, erarigaj tezoj, celante "klarigi" la nunan "krizon" de la movado, sed ili fakte pliprofundigas ĝin? Ili eĉ iel urĝas kun siaj falsaj opinioj, kvazaŭ ili mem volus realigi siajn negativajn profetaĵojn. En la tempo de Lapenna ili ne havis kialojn kaj eblecon konfuzigi la movadon.

Mi ofte asertis, skribe kaj buŝe, ke Lapenna estis granda oratoro, larĝvida sciencisto, altprestiĝa personeco, kiu dediĉis siajn kapablojn al la E-movado. Pro tiu sinteno mi perdis kelkajn miajn malnovajn amikojn, sed, skribis antikva filozofo, "Plato estas mia amiko, sed pli granda amikino estas la veraĵo"; la movado bezonas veraĵojn, ĉar, en kolektivo, partio, movado, ŝtato, ĉie ajn, kie io estas pli grava ol la vero, la dekadenco havas leĝan karakteron.

.....

Nu, vera proverbo diras ke "neniu estas apostolo en sia vilaĝo": por la homoj ĉirkaŭantaj la "apostolon" li estas nur "unu el inter ili". Ĉar mi ne rekontiĝis kun Lapenna, mi vidas lin de malproksime, nur kiel historian personecon.

Mia edzino kaj mi sincere bondeziras vin pro via plurflanka agado defende de Lapenna, por ke li ne estu denove entombigita, ĉar liaj pensoj kaj faroj povas grave roli en la movado. Vian sindoneman laboron ne kaŭzas simple la ambicio montri, kia homo estis via edzo, sed vi vere kaj prave estas konvinkita pri lia ege aktuala valoro. Mia edzino kaj mi estas certaj, ke ne nur komprenebla amo ludis rolon en viaj rilatoj kun Lapenna, sed ankaŭ la "spirita parenceco". Ni povas lin kompreni: Ne nur viaj juneco kaj beleco fascinis lin, sed ankaŭ viaj spiritaj kvalitoj.

Miaopinie, la E-movado ŝuldas al vi grandan dankon.

Altestime via

I.F. Bociort

P.S.: Tiu ĉi letero ne entenas multe pri Lapenna, sed, se vi kredas utile, vi povas aperigi ĝin (aŭ parton de ĝi).

*El "La Paperoj" de D-ro Ante Ramljak (16.04.1893 – 21.04.1972):*

.....

"La 25-an de julio 1941 mi definitive forlasis por ĉiam la ejojn en strato Frankopanska – mian loĝejon kaj kancelarion kun ĉiuj aĵoj, same la advokatecon, kaj forkuris kun unu malgranda valizo.

Kaj kion diri pri mia advokateco? Ĝi ne estis ia kutima advokateco; ĝi estis batalo kaj dekdujara lukto kontraŭ la sama malamiko – faŝismo kaj naziismo, ties maljustaĵoj kaj la Kvina kolono; ĝi estis defendbatalo, al kiu en la jaro 1941 aliĝis ĉiuj popoloj de Jugoslavio. Advokateco estis mia armilo en tiu batalo. La humoro kaj vivelano vivtenis mian psikan kondiĉaron dum la tuta batalo.

Pretere mi mencias, ke en mia advokatejo laboris Ivo Lapenna, kiu tiutempe okupiĝis pri la Internacia Lingvo, pri tiu kultura kaj lingva problemo. Ĝi estis lia preferata kromokupo tiam, same kiel ĝi estas nun. Pro defendo de kulturo antaŭ la perforto d-ro Lapenna kaj mi devis forkuri el Zagreb kaj rifuĝi en Split.

La klopodoj de Lapenna en solvado de internacia lingvoproblemo estas pli gravaj por la homaro ol la muziko de Beethoven aŭ la politiko de Churchill. Ja, se troviĝus iu kultura ŝtatestro kiu el budĝeto destinita por superraketoj por hommortigado disponigus kelkajn milionojn da dolaroj al budĝeto por lanĉo de esperantaj superraketoj, kiuj ne mortigas sed spirite konkeras kaj alproksimigas la homojn, tiel ke al d-ro Lapenna kaj al liaj kunlaborantoj tiu laboro fariĝu ilia ĉefa kaj sola okupo, kaj ne la akcesora – tiu ŝtatestro enirus la kulturan homarhistorion anstataŭ resti inter la murdistoj."

## La Homo Ivo Lapenna kaj la Internacia Lingvo

Oni ne povas raporti historie korekte pri kiu ajn agado de la Esperanto-Movado sen mencii la nomon Ivo Lapenna. Kiam en Interreto oni skribas pri modela elparolo de Esperanto, oni ĉiam mencias ne oratorojn, sed esperantistojn, kiuj havas sufiĉe bonan elparolon. Tamen estas grandega diferenco inter tiu kategorio kaj la kategorio de *veraj* oratoroj. Mi tutsimple ne povas kompreni, kial oni ne utiligas tiun unikan okazon por informi pri la plej granda oratoro de la Esperanto-Movado iam ajn, nome Ivo Lapenna, kiu, cetere, estis unu el la plej famaj oratoroj de la mondo en pluraj lingvoj. Estas unike, ke ni havis tian personecon en la sino de la Esperanto-Movado mem. Multaj konataj esperantistoj – inkluzive pluraj el la gvidantoj de la Movado – lernis la prononcadon aŭskultante la kasedojn kaj kompaktdiskojn kun liaj paroladoj kaj la prelegadon laŭ lia verko *Retoriko*.

La 15-an de decembro 1984 fondiĝis la *Fondaĵo Ivo Lapenna* kaj ekde 1997 ankaŭ la *Internacia Scienca Instituto Ivo Lapenna* ([www.ivolapenna.org](http://www.ivolapenna.org)), kiuj okupiĝas nur pri la persono kaj pri la agado de Ivo Lapenna. Iliaj celoj estas studi la verkojn de Ivo Lapenna, informi la gazetaron kaj protekti liajn nomon kaj verkojn kontraŭ diversaj konsciaj falsaĵoj, kiuj ĝis nun aperis kaj

eventuale estonte aperos en verkoj kaj artikoloj, kiuj *ŝajnas* historie korektaj.

### La Homo Ivo Lapenna

Dum niaj multnombraj vojaĝoj kaj kunvenoj mi ankaŭ ekkonis multajn interesajn esperantistojn. En ĉiuj lokoj la homoj – junaj kaj maljunaj – amasiĝis ĉirkaŭ Ivo Lapenna. La tiamajn junajn homojn kiel Carlo Minnaja, John Wells, Humphrey Tonkin, Ulrich Lins kaj multajn aliajn mi rigardis kiel amikojn. En tiu vigla rondo Ivo Lapenna ĉiam estis la fascina kaj inspira centro. Krom kulturaj kontribu-aĵoj li ankaŭ kontribuis per eksterordinaraj, humurplenaj spritaĵoj kaj anekdotoj. Ivo Lapenna tre ŝatis esti inter junaj homoj, kaj li vere ĝuis renkonti inteligentajn, aktivajn gejunulojn. Li rigardis la supre menciitajn nomojn kiel eblajn posteulojn. Ivo Lapenna estis/as inspiranto, instruanto kaj modelo de pluraj generacioj de esperantistoj. Persone mi lernis preskaŭ ĉion de li: Ekz. Esperanton, klasikan muzikon, arton, literaturon kaj plej grave la signifon de lia koncepto “Humaneca Internaciismo”.

### Esprimitaj pensoj pri Ivo Lapenna

Dum la multaj kunvenoj, kiujn mi ĉeestis, mi spertis, ke Ivo Lapenna estis ekstreme demokrata kaj eksterordinare inspira gvidanto. Kvankam li mem

fulmorapide pensis kaj laboris, li tamen preskaŭ senĉese por progreso de Esperantis sin devigita doni al siaj kunlaborantoj sufiĉe da tempo por esprimiĝi. Por doni ekzemplon mi citas la tiaman prezidanton de UEA, s-ro E. Malmgren, kiu en sia adiaŭa parolado en Kopenhago, 1956, i.a. diris: “Neni- am mi vidis pli demokratan personon, persono, kiu pli rigore observas la decidojn de la plimulto kiel prof. Lapenna” (laŭ la protokolo de UEA). Pri la geneco de Ivo Lapenna mi mencias du citaĵojn. La nederlanda d-ro Verloren van Themaat, kiu skribas en sia recenzo pri lia verko “Elektitaj Paroladoj kaj Prelegoj” (Suplemento al “Retoriko”) 1966: “... Kiel gvidantojn la Esperanto-Movado bezonas ne homojn, kontentajn teni la aferon funkcia, sed homojn daŭre strebantajn progresigi la aferon, kaj tia persono estas Lapenna! Ankaŭ pri la ideologia fono de Esperanto, egalrajta kunlaborado de ĉiuj homoj, li parolas multe. Estas frapante, kiel profunde Zamenhof influis homojn multrilate pli talentajn ol li mem!” Due, el la nekrologo en Jugoslavia Stelo, 31.12.1987, de prof. B. Popovic: “... Eĉ sur unuopaj agadkampoj por Esperanto ne estis facile trovi unuopulojn superintaj Prof. Lapenna, sed rigardante kune, plurflanke, mi ne scias ĉu iu estas komparinda kun li, ĉar en lia persono troviĝas tre altaj ecoj: genia intelekto, larĝa eruditeco, scienca pritrakto de la problemoj, plurlingva oratoreco, profunda laborkapablo – ĉio tio utiligata

En Varsovio, 1995, kie okazis la Internacia Esperanto-Konferenco kun la temo “Vivo kaj Verko de Ivo Lapenna”, la psikologo, d-ro T. Tyblewski, faris prelegon kun la titolo: “Ivo Lapenna, homo danĝera, ĉar efektive libera”. Vere brila prelego kun profunda analizo de la karaktero de mia edzo. Ekzemple li montris, ke totalisma sistemo timas la nuran ekziston de tiel libera homo. Kiel ekzemplo d-ro Tyblewski rakontis pri la okazintaĵo dum la Inaŭguro de la Universala Kongreso en Budapeŝto, 1966, kiun ankaŭ mi ĉeestis. Kvankam Ivo Lapenna anticipe akcentis al la parolantoj, ke pro la strikta neŭtraleco de Universala Esperanto-Asocio neniu rajtas fari politikan propagandon, tamen la orientgermana ambasadoro ripetis la kutimajn frazojn de la komunisma, propaganda maŝino. Ĉeestis multaj ambasadoroj, ankaŭ el orientaj landoj. Mi sidis sur la unua vico inter la dana kaj aŭstria ambasadoroj por traduki al ili la paroladojn. Ili flustris unu al la alia, ke estas skandala konduto de tiu orientgermano. Murmuro ekregis en la salono. Ankaŭ Ivo Lapenna estis videble maltrankvila. Miaj du najbaroj malrapide komencis leviĝi. Vidante tion Ivo Lapenna tre firme interrompis la parolanton malgraŭ tio, ke interrompo de ambasadoro estas nekutima kaj ofendo al la koncerna lando. Plurminuta, *fulmontondra* aplaŭdego sekvis, tute speciale

fare de la ĉeestantoj el la orientaj landoj. Ili ne nur aplaŭdegis, sed ankaŭ piedfrapadis la plankon. En sia brila prelego d-ro Tyblewski rakontis pri la granda humiligo, kiun multaj el la orientaj esperantistoj ekhavis aŭskultante la paroladon de la orientgermana ambasadoro. La interveno de Ivo Lapenna vekis tiel grandan entuziasmon, ĉar, fine, ili spertis homon kun la necesa kuraĝo firme ĉesigi la ĉiam ripetitan propagandon. Iliaj sentoj eĉ pli fortikiĝis, ĉar tiu persono estas ilia Prezidanto. La morgaŭan tagon la ambasadoro pardonpetis al Ivo Lapenna. Tamen, depost tiu interveno dum la Kongreso la malamikeco al "la bastiono de la neŭtraleco", kiel la komunisma bloko nomis Ivo Lapenna, akriĝis. Rezulte de tio kaj laŭ la kutima komunisma sistemo falsaj "onidiroj" kaj malagrablaj aludoj eksvarmis en la tuta Esperanto-Movado por subfosi lian aŭtoritaton.

La tri antaŭe menciitaj citaĵoj kaj la prelego de d-ro Tyblewski (tiun unikan prelegon vi povas aŭskulti sub "Sonregistraĵoj" en la hejmpaĝo de Fondaĵo Ivo Lapenna: [www.ivolapenna.org](http://www.ivolapenna.org)) donas klaran bildon pri la persono Ivo Lapenna kaj pri liaj labortrajtoj. Ĉiam mi ĝuis liajn virtuoza kaj dinamisman laborkapablon dum nia komuna kunlaborado. Liaj diktaĵoj al mi fluis el lia buso per jam finpripensitaj frazoj en lia tre konata kaj elokventa stilo. Se mia tajpado ne ĉiam estis sufiĉe rapida, li povis ripeti kaj precize per la samaj

vortoj redikti siajn frazojn. Neniam li estis malpacienca, tute male, ĉiam li inspiris kaj instigis la homojn fari sian plej eblon.

### **La helpemo de Ivo Lapenna**

Li ĉiam estis engaĝita, kiam temis pri seriozaj problemoj de ĉiaspecaj homoj. Kaŝe li helpis multajn, kiuj estis en danĝero pro kruelaj, politikaj sistemoj. Liaj donacemo kaj helpemo al homoj, kiuj estis en malfacilaj situacioj, estis senfine grandaj kaj nekompereblaj. Ĉiam li helpis kaj donacis, kiam li vidis mizeron, ĉu temis ekz. pri homoj surstrate, ĉu pri publikaj kolektadoj. Amnestio Internacia ĉiam povis kalkuli pri lia senpaga, faka helpo. – La plej multaj el la esperantistoj spertis, ke, kiam li kolektadis monon por diversaj celoj en la Esperanto-Movado, li ĉiam estis la unua, kiu abunde kontribuis. La plej grandan parton de la tantiemo por la verko *Esperanto en Perspektivo* (EeP) li deziris doni al la du junaj kunlaborantoj/studentoj, kvankam li mem verkis la plej grandan parton de la verko kaj samtempe estas ĝia ĉefredaktoro. Sian propran tantiemon li intencis donaci al la *siatempa Centro de Esploro kaj Dokumentado* (CED), kiun li mem iniciatis kaj fondis kaj kies direktoro li estis ĝis 1974 (ankaŭ tiun funkcion li decidiĝis forlasi).

### **Nigra makulo de la historio de UEA**

Montrigis, ke depost 1974 la karaktero de CED komplete ŝanĝiĝis. Tiu nova

CED havas tute aliajn celojn, kiujn Ivo Lapenna neniel povis akcepti. Pro tio li retiris la proponon kaj postulis parton de la tantiemo. Ĝis hodiaŭ UEA ne pagis malgraŭ tio, ke daŭre ripetis sian postulon, por ke afero jure ne malaktualiĝu. Kompreneble, de post lia forpaso ankaŭ mi daŭre ripetadas tiun postulon. *Fondajo Ivo Lapenna* estus povinta multe pli efike utiligi tiun – intertempe nun grandegan – sumon. Jam delonge la monumenta verko *Esperanto en Perspektivo* (EeP) estas elĉerpita. Ivo Lapenna diris, ke, kiam oni represos ĝin, oni nepre aldonu *Hamburgo en Retrospektivo* kaj la rubrikon *Esploro kaj Dokumentado* (ED) el la revuo *Horizonto*, ĉar ĉio ĉi estas suplemento al *Esperanto en Perspektivo*. Sen tiuj ĉi aldonajoj la historia verko ne estus kompleta.

### **Karakterizaj trajtoj de Ivo Lapenna**

Ivo Lapenna devenas de nobela familio, sed nek lia patro nek li mem deziris uzi siajn titolojn. Jam de sia infanaĝo, mia edzo estis eksterordinare kara kaj atentema. La hejmo de liaj gepatroj estis nobela palaceto kun pluraj deĵorantoj. Inter ili estis analfabeta servistino, kiu por li estis tre kara. Proprainiciate li instruis al ŝi legi kaj skribi. Pro tio ŝi estis tre danka kaj poste eĉ pli adoris lin.

La infanaj sentemo kaj atentemo de Ivo Lapenna daŭris la tutan vivon. Per siaj preskaŭ ĉiutagaj leteroj kaj ĉiutagaj

telefonaj alvokoj li sencese esprimis sian senfinan amon al mi. Dum nia 31-jara kunestado mi ĝuis *ĉiun* momenton kaj estis inspirita de liaj bonkoreco, karismo, inteligenteco, humuro, enordama laborkapablo kaj de liaj krea kaj genia pensmaniero. En privataj societoj kaj ankaŭ dum grandaj, publikaj festoj li ĉiam estis la centra figuro, i.a. pro siaj eksterordinaraj ĉarmo, beleco kaj vigleco. Li distris per interesaj interparoloj, spritaj anekdotoj, amuzaj parodioj. Kelkfoje li kantis per sia belsona, forta kaj profunda baso. Absolute ĉiuj homoj, junaj kaj maljunaj, altrangaj kaj simplaj homoj adoris lin kaj deziris esti en lia societo.

Kiel 17-jara gimnaziano Ivo Lapenna sciiĝis pri la Internacia Lingvo. Li tuj komprenis ĝian valoron kaj komencis sian memstudadon. En 1929 li fondis, kune kun inĝeniero Ivo Godek, la klubon "Studenta Esperanto-Klubo" en Zagreb (*Esperanto en Perspektivo* [EeP] p. 474). Mi citas el EeP, p. 84-85: "En universitataj medioj sukcese agis studentaj aŭ akademias Esperanto-kluboj en pluraj landoj. ... La plej aktiva el ili sendube estis la studenta, poste Akademia Esperanto-Klubo en Zagreb (1929-1941), kiu ĝis aprilo de 1941, kiam la naziaj-faŝistaj armeoj invadis Jugoslavion, funkciis ankaŭ kiel administra centro de Studenta Tutmonda Esperanto-Ligo (STEL-o)."

Ivo Lapenna estis ankaŭ redaktoro de la fama, jugoslavia organo *La Suda Stelo*,

revuo socia, kultura, literatura kaj primovada. Ĝi aperas – kun kelkaj interrompoj – ekde 1932. Pro lia multjara aktivado ĝi influis la tutan Esperanto-Movadon. Hodiaŭ ĝi estas la plej grava fonto de la tiama Esperanto-historio. Ivo Lapenna mem verkis multegajn artikolojn, ofte sinonime, ĉar por li ne estis oportune, ke lia nomo tro ofte aperu – kutimo, kiu daŭris ĝis lia forpaso. Li ankaŭ ne deziris, ke lia foto tro ofte aperu en gazetoj kaj revuoj, kiujn li mem gvidis. Tiun deziron liaj kunlaborantoj de la revuo *Horizonto* (1976-1987) ne ĉiam obeis. Ekde 1981 sub la ĉefredaktado kaj gvidado de Ivo Lapenna *Horizonto* fariĝis same influa kaj historie valora kiel la tiama *La Suda Stelo*.

Estas konate, ke Ivo Lapenna finis la muzikan akademion. Li lerte ludis violonĉelon, ofte en orkestroj, precipe en siaj universitatoj. Kiel studento li devis elekti inter la muziko kaj la juro. Liaj profesoroj asertis, ke li estus povinta fariĝi eminenta en ambaŭ fakoj. Li finis kaj la akademion de muziko kaj la juran studon en la universitato kun eminentaj notoj. Kiel konate li fariĝis mondfama juristo. Tamen, la klasika muziko estis por li *tre* necesa, kaj li havis sennombrajn listigitajn sonbendojn/bobenojn de tiaspeca muziko. Li sendadis al mi kopiojn kun karaj kaj informaj vortoj, ĉar ankaŭ tiun intereson ni centprocente dividis. Kelfoje mi ricevis kasedojn kun liaj propraj poemoj,

verkitaj *nur* por mi, kaj kun muziko, kiun li mem komponis.

Du ecoj de Ivo Lapenna, kiujn mi deziras emfazi, kaj kiujn mi tre admiris, estis liaj honesteco kaj sincereco, kiuj por li estis la plej gravaj homaj trajtoj. Neniam mi spertis, ke li diris unusolan mensogon. Lia propra veramo kaŭzis, ke li atendis la saman honestecon kaj veraman sintenon de aliaj. En sia profesia vivo li ĉiam estis alte respektata. Liaj studentoj tre admiris lin pro liaj klereco, malfermiteco, klarvideco, libereco kaj internacia akordiĝo. En la okcidenta mondo multaj el la tiamaj gejunuloj sentis sin altiritaj de la komunisma ideologio. Per siaj profundaj analizoj Ivo Lapenna trankvile malfermis al ili la okulojn pri la mispaŝoj fare de la soveta sistemo, tiel ke ili mem konsciiĝis kaj komprenis, kial ankaŭ tiu sistemo ne taŭgas. Kontraste al la soveta koncepto "Proleta Internaciismo" Ivo Lapenna lanĉis sian koncepton "Humaneca Internaciismo", kiu akordiĝas al la internacia konvencio pri la Homaj Rajtoj.

La instruado de Ivo Lapenna neniam estis teda, tute male, liaj prelegoj estis veraj oratoraĵoj, aldonitaj per spritaĵoj. Li ĉiam estis preta helpi siajn studentojn per fakaj konsiloj, kaj ili adoris lin. Tion mi aŭdis de diversaj profesoroj kaj studentoj, kaj, cetere, mi mem spertis tion, i.a. en la granda aŭditorio de la universitato. Dum la

junulara ribelado en Londono en 1968, kiam la studentoj kuŝis sur la ŝtuparoj de la universitato kaj tiamaniere blokis la enirejon, Ivo Lapenna tutsimple pasis inter ili, kaj kiel la sola profesoro ili lasis lin eniri. Tion ĉi mi rakontas por doni al vi nur palan bildon de lia populareco ankaŭ ekster la Esperanto-Movado.

Pluraj el la plej gravaj sciencistoj de la mondo venis al la universitato de Ivo Lapenna, nome la mondfama *The London School of Economics and Political Science*, parto de la *Universitato de Londono*, “nur por havi la eblecon paroli kun li” kaj “premi al li la manon”. Tiel respektata li estis kaj daŭre restas en la scienca mondo. Parenteze, pro la renoma kaj prestiĝa universitato pluraj prezidentoj kaj monarkoj studis tie, i.a la Reĝino Margrethe II de Danio.

Ankaŭ la deĵorantoj de la universitato multe admiris kaj ŝatis Ivo Lapenna pro lia ĉiama afableco. Iam la du afrikanaj pordistoj estis vokitaj al lia ĉambro por transporti kelkajn kestojn kun libroj. Tiam unu el ili demandis, “ĉu vi permesas, ke mi premu al vi la manon, ĉar vi estas la plej granda ‘gentlemano’, kiun mi iam renkontis en mia vivo?” Mia edzo estis iom embarazita, sed kompreneble donis al li la manon. Kun larmoj la afrikano plu diris: “Vi estas la sola profesoro en la tuta universitato, kiu parolas kun ni. Vi estas la plej ŝatata profesoro el ĉiuj.” Poste la alia

afrikano kun larmoj demandis, “ĉu ankaŭ mi rajtas premi al vi la manon?” Mia edzo estis tre kortuŝita kaj tuj telefonis al mi por rakonti pri la epizodo.

Post la forpaso de mia edzo la Universitato okazigis imponan solenaĵon, “Memorial Service”, en la salonego de la fondinto de la Universitato. La Rektoro tre varme bonvenigis min. Post ties funebra parolado, tri aliaj famaj profesoroj bele parolis pri mia edzo kaj pri lia signifoplena laboro. Unu el ili estis prof. d-ro John Wells, kiun la Rektoro de la Universitato alvokis, por ke li parolu pri la Esperanto-laboro de Ivo Lapenna. Unika evento en universitata medio kaj granda honoro al la Internacia Lingvo, Esperanto, kaŭzita de la enorma prestiĝo, kiun Ivo Lapenna ĝuas en la scienca mondo. Pro la fakto, ke mia edzo mem ludis violonĉelon, la ĉefo de la jura fakultato invitis konatan, junan violonĉeliston por ludi verkon de Johann Sebastian Bach. Poste mi dankis al la violonĉelisto, kaj li respondis: ”Estas por mi aparta honoro ludi por la granda humanisto, Ivo Lapenna, kiu mem estis tre lerta violonĉelisto.”

Dum la posta akcepto en la Biblioteko la du antaŭe menciitaj afrikanoj venis al mi kaj denove kun larmoj ripetis tute la samajn vortojn, pri kiuj mia edzo antaŭ longe rakontis. ...



## La aŭtoritato de Ivo Lapenna

La aŭtoritato de Ivo Lapenna ne estas kaŭzita de lia prezidanteco de UEA, sed ĝi estas kaŭzita de liaj multaj talentoj.

La unua fojo, kiam mi spertis, ke li rifuzis la prezidantecon, estis jam dum mia unua Universala Kongreso en 1956 en Kopenhago. Dum la kongresa balo ni interkonsentis renkontiĝi la morgaŭan tagon en Tivoli je la 20-a horo vespere por poste iri danci en Lorry, konata kaj bela dancrestaŭracio. Tie, en la bela ĝardeno de Tivoli, mi staris en blanka dekoltita balrobo sen skarpo aŭ mantelo. Malgraŭ la varma vespero mi komencis frosti. Mi tamen atendis, ĉar antaŭe mia amiko diris al mi, ke li kunsidos, kaj mi estis absolute pli ol certa, ke li venos. Fine, tuj antaŭ noktomezo li aperis tute malfeliĉa pro sia terura malfruiĝo, sed feliĉa pro mia ĉeesto. Li rakontis, ke oni volus elekti lin kiel prezidanton, kion li rifuzis, ĉar li opiniis, ke tiutempe la plej bona kombino de la Estraro estus, ke prof. Canuto estu prezidanto, kaj ke li mem restu ĝenerala sekretario. La fakto, ke li ankoraŭ ne ricevis anglan ŝtatanecon (pro la konata Connor-afero!) plifortigis lian starpunkton. Li uzis ĉiujn siajn fortojn por persvadi profesoron Canuto fariĝi prezidanto kaj inverse. Fine, li sukcesis dirante: "Se mi havus iun Ivo Lapenna kiel Ĝeneralan Sekretarion, mi ne hezitus unusolan sekundon fariĝi Prezidanto", kaj tiu argumento konvinkis profesoron

Canuto. Kiel vi povas konstati, ankaŭ en tiu ĉi kazo li pensis nur pri la bono de Esperanto. Kompreneble, ke mi akceptis lian klarigon, kaj la sekvantan tagon ni iris danci.

Nur en 1964 li akceptis fariĝi Prezidanto. Neniel li sentis sin honorigita pro la prezidanteco. Lia prestiĝo ekster la Esperanto-Movado estis tiel granda, ke li povis nur doni prestiĝon al la Movado, absolute ne inverse.

Dum la Universala Kongreso en Hamburgo, 1974, oni provis persvadi Ivo Lapenna akcepti Honoran Prezidantecon de UEA (v. *Hamburgo en Retrospektivo*, 1977). Kompreneble, ke li rifuzis. Tiu konduto montras, ke la proponintoj neniel komprenis la karakteron de Ivo Lapenna, nome ke li estis homo absolute libera kaj neniel "aĉetebla". Homoj, kiuj konas la revuon *Horizonto* kaj partoprenis la Internacian Jubilean Esperanto-Konferencon en Graz, 1987, scias pri lia tiama laborado, kiun li daŭrigis per la samaj energio kaj instigo kiel ĉiam. Oni diris, ke Ivo Lapenna kontraŭbatalis UEA, kio estas *kompleta sensensaĵo*, ĉar li volis nur bonon al UEA, kiu dum lia gvidado evoluis el mizera stato al moderna mondorganizaĵo kun visioj. Per siaj artikoloj en la revuo *Horizonto* li sukcesis ĝis sia forpaso en 1987 fiaskigi – kvankam ne interne – la planojn de KGB komunistigi UEA.

Ivo Lapenna rigardis la Konferencon *La Internacia Jubilea Esperanto-*

*Konferenco* en Graz, Aŭstrio, 1987, kiel la kronon kaj la finon de sia *organiza* laboro, kiun li faris por Esperanto depost 1974. Ĝia temo estis *Cent Jaroj de Esperanto-Kulturo*, kaj i.a. 10 tre konataj kaj fake kompetentaj esperantistoj lekciis. La Internacia Honora Komitato de la Konferenco konsistis el la plej mondkonataj kaj kompetentaj sciencistoj – ĉiuj esperantistoj – unike en la historio de la Internacia Lingvo. La titolo de la Inaŭgura Festparolado de Ivo Lapenna estis “Esperanto kiel lingva esprimo kaj instrumento de ‘Humaneca Internaciismo’”, en kiu li profunde analizis sian koncepton *Humaneca Internaciismo* kaj montris, kiel ĝi estas nedisigeble ligita al la Internacia Lingvo, Esperanto. Resumo de tiu parolado, lia parolado de la Inaŭguro de la Monumento *La Espero* kaj ĉiuj 10 lekcioj troviĝas en *Memorlibro Graz 1987 – La Internacia Jubilea Esperanto-Konferenco – Cent Jaroj de Esperanto-Kulturo*. Ĝia kovrilpaĝo montras la belan monumenton de la mondkonata, dana skulptisto, Jesper Neergaard, donacita al Esperanto pere de Ivo Lapenna kaj starigita sur la Esperanto-Placo en Graz, Aŭstrio. La tekston sur la soklo Ivo Lapenna mem verkis. Ĝi esprimas la kvintescon de liaj pensoj pri Esperanto: ‘*La Espero*’ – *Por Monda Komunikado – En Paco kaj Libero*. Por li la libereco estis esenca. Jam en 1981 Ivo Lapenna kunvokis al kunlaborado inter ĉiuj Esperanto-organizaĵoj, grandaj kaj malgrandaj, kaj al ĉiuj, kiuj uzis Esperanton, por ke oni mondscale kaj digne celebru la 100-jaran datrevenon de Esperanto. Li eĉ ellaboris la proponon, “Skizo de Baza Programo”. Okazis kelkaj kunsidoj. Unu el ili estis aranĝita en La Chaux-de-Fonds. Montriĝis, ke UEA partoprenus la kunlaboron nur, se ĝia tiama prezidanto, s-ro Maertens, aŭtomate fariĝus prezidanto de la tuta aranĝo. Ivo Lapenna proponis demokratian elekton inter ĉiuj liberaj memstaraj organizaĵoj, kiuj deziris kunlabori. Tiun demokratian elekton UEA rigore rifuzis, kaj la tuta plano pri kunlaboro forfalis. Post tiu malfeliĉa evento Ivo Lapenna plurfoje klopodis krei iun formon de kunlaboro, sed vane. ....

**“Hamburgo en Retrospektivo”**

Post la Universala Kongreso de UEA en Hamburgo, 1974, Ivo Lapenna verkis la jam menciitan libron *Hamburgo en Retrospektivo – Dokumentoj kaj Materialoj pri la Kontraŭneŭtraleca Konspiro en Universala Esperanto-Asocio*. Li estis konvinkita, ke estis necese verki ĝuste tiun libron por doni historie ĝustan bildon de la okazintaĵoj kaj por preventi, ke la samaj groteskaj aferoj ripetiĝu en la estonteco de la Internacia Lingvo, Esperanto. Ivo Lapenna estis tre sentema homo kun alte moralaj, etikaj kaj kulturaj valoroj. Li estis senfine dolorigita pro la fakto, ke la menciitaj aferoj povas okazi en humanisma movado. Tiuj ĉi suferoj estis kaŭzitaj sole pro lia

amo al Esperanto. Por Ivo Lapenna amason da demandoj, sed mia edzo estis anima premo, ke laboro en kultura organizado kiel tiu de la Esperanto-Movado povas vekti tiom da enviaj, jaluzaj kaj malsane ambiciaj sentoj. Ekde la unuaj tagoj de Esperanto tiuj malagrablaj sentoj kaŭzis, ke multaj valoraj laborhoroj estas perditaj per

sen signifaj kaj negativaj korespondado, debato, diskutoj kaj disputoj. Ankaŭ nun tio okazas. Ofte oni aludis, ke mia edzo estis kolera kaj "kverelis". Mi asertas, ke absolute *neniam* li "kverelis" kun kiu ajn – tio estis sub lia digno. Li nur diskutis – sen kiu ajn persona atako – ekzemple fakajn aferojn aŭ aktualajn problemojn. Kelkfoje, li ŝatis science polemiki kun inteligentaj personoj.

Li egale respektis ĉiujn homojn, kiuj skribe aŭ buŝe kontaktis lin, kaj tre afable respondis al ĉiuj leteroj, ĉar li estis absolute la plej afabla, kultura/civilizita homo, kiun oni povas imagi.

### **Kiel informi pri la Internacia Lingvo?**

Ivo Lapenna *neniam* altrudis la Internacian Lingvon al kiu ajn, tute male. Ofte, kiam ni butikumis kaj, kiel ĉiam, tute normale interparolis en Esperanto, oni demandis, kiun lingvon ni parolas. En Italio oni supozis, ke ni parolas hispane, kaj en Hispanio itale. Tiam mia edzo tute trankvile, sen entuziasmo, respondis, ke ni parolas la Internacian Lingvon, Esperanto. Ĉiufoje la homoj scivoleme starigis

rapide finis la interparolon dirante, ke ni ne havas pli da tempo kaj devas foriri. Surprizitaj, la homoj daŭrigis la diskutadon. Tiamaniere oni multe pli taŭge kaj efike vekas la interesiĝon pri Esperanto – nepre ne per propagando, sed per informado.

Laŭ la konvinko de Ivo Lapenna oni devas unue mem plibonigi sian lingvaĵon, due, taŭge informi pri la lingvo, kaj, trie, uzi ĝin kiel eble plej ofte. El lia verko "Retoriko" (Ĉapitro VI, 4. Unueco, p. 108) mi citas: "... La evoluo de la Internacia Lingvo ne estas diktata de supre, sed ĝi okazas de malsupre, de la personoj kiuj praktikas ĝin." En la sama ĉapitro, p. 110, li skribas: "... la Internacia Lingvo liberigas la personojn de la nacilingvaj ĉenoj kaj flugigas ĝin libere de lando al lando, de nacio al nacio, tra la tuta mondo." Tiuj ĉi du citaĵoj montras, ke lia postulo pri daŭra uzado de la Internacia Lingvo estas kaŭzita de lia konvinko, ke la lingvo influas la homan pensmanieron. Rilate al informado vi povas legi pri la pensoj de Ivo Lapenna en la broŝuroj *La Principaro de Frostavallen* kaj *Por pli efika informado*.

Mi estas konvinkita, ke ĝis tiam, kiam oni denove „utiligos“ la pensojn kaj konsilojn de Ivo Lapenna kaj ĉesos eviti lian influon, la laboro de UEA daŭre stagnas. Tiu UEA, kiun mi konis, estis *konstante* plena de dinamismo. Ĉiam ĝi laboris demokratie laŭ la konkretaj planoj. Kiel eble plej ofte la

laborplano de UEA, verkita de Ivo Mia revo estas la sama kiel tiu de Lapenna, sekvis tiun de Unuiĝintaj Zamenhof-Lapenna, nome ke la espenacioj (ekz. “Jaro de Internacia rantistoj ĉesigu la eternan rivaladon pri Kunlaboro”, 1965, kaj multaj aliaj). Por povo kaj influo, ke ili ĉesigu la mallongigi mi mencias nur kelkajn el la deformon de la lingvo mem, zorge tiamaj aktivaĵoj. Ivo Lapenna iniciatis selektu la plej kompetentajn membrojn kaj fondis i.a. la jam menciitan “Centro al la *Akademio de Esperanto*, kaj ke ili de Esploro kaj Dokumentado” (CED); unuece respektu la Fundamenton. Mi li ludis gravan rolon en la lanĉo de la antaŭvidas la tagon, kiam oni mencias tiam nomata *Internacia Somera* la nomon Ivo Lapenna, pro *liaj meritoj, Universitato* ekde 1948 (nun: Internacia kaj kiam ni ne plu bezonas korekti kaj Kongresa Universitato); Belartaj Konkurenti ĉiaspecajn “onidirojn” pri li, kursoj; Oratora Konkurso (siatempe kaŭzitaj de la samaj rivalado kaj envio. premiita per la arĝenta pokalo “Pokalo Mi estas konvinkita, ke venos la tago, Ivo Lapenna”); La Internacia Arta kiam estontaj generacioj komprenos, ke Teatro (sub la gvidado de la profesia Ivo Lapenna ja laboregis *sole* por la aktoro, Srdjan Flego); Magnetofona bono de Esperanto. Li forte deziris, ke Servo; Gazetara Servo kaj multajn ĉiuj esperantistoj unuiĝu kaj harmonie aliajn aktivaĵojn. Frue dum sia aktivado kunlaboru en la intereso de la Inter-Ivo Lapenna difinis sian koncepton nacia Lingvo kaj en la intereso de la *Aktiva Neŭtraleco*, sur kiu la neŭtraleco tuta homaro. de UEA baziĝis ĝis 1974.

